

La Celo de la Vivo

Kiam vi rigardis al vi mem, kaj al aliaj homoj, ĉu vi ne scivolas "Kiu mi estas? De kie mi venis? Kial mi estas ĉi tie? Kien mi iros? Ĉu Dio havas celon por mi? Por mia familio? Por miaj geamikoj? Por ĉiuj?" La respondo al ĉi tiuj demandoj estas - jes! Dio havas celan planon por vi kaj por ĉiuj. Li ankaŭ kreis la eblecon por via familio, viaj geamikoj, kaj ĉiu el Siaj infanoj, kiuj vivas sur la tero scii pri tiu vivo-celo kaj kiamaniere triumfi je ĝi. Pere de revelacioj de Dio al Siaj profetoj, la Sanktaj Skriboj estis skribitaj por klare montri al ĉiuj homoj la vojon al savo per Jesuo Kristo, la Filo de Dio, la Savanto de la mondo. La Savanto diris "Mi estas la vojo, la vero kaj la vivo" ... "Venu sekvi min."

La celo de ĉiu homo devas esti la trovado de la vojo de Kristo kaj sekvi ĝin. Serĉi la vojon de la Savanto estas la unua paŝo. Por vi mem, vi nur povas elekti la Sinjoron, se vi volas. Vi, via familio kaj viaj posteuloj estos eterne benataj pro la korekta decido. La vortoj, kiujn vi ĉi-sube legos rekte rilatas al via persona savo. Via trankvila primeditado de la sanktaj vortoj de la Sinjoro alportos la respondojn al ĉi tiuj gravaj demandoj al via menso: Kiu mi estas? De kie mi venis? Kion faris Dio kaj Kristo por mi? Kion mi devas fari por mi mem por havi pli feliĉan kaj abundan vivon? Kiel mi povas atingi eternan feliĉon?

De Kie Mi Venis?

Via vivo ne komenciĝis ĉi tie sur la tero. Vi vivis antaŭ via naskiĝo; vi vivos en la spirita mondo post la fino de via mortema vivo. Tiam, kaj tra la eternecoj, vi vivos por ĉiam kiel releviĝinta estulo. Sed, ĉu vi vivos en gloro aŭ en malĝojo? Tio estas decido, kiun nur vi kapablas fari.

La Celo de Dio por la Homaro

"Jen, ĉi tiu estas mia laboro kaj mia gloro, okazigi la senmortecon kaj eternan vivon de la homaro." Moseo 1:39.

Dio Vin Kreis

"Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Le kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin." Genezo 1:27

Vi Respondekas al Dio

"Cetere ni havis patrojn de nia korno, kiuj nin punis, kaj ni respektis ilin; ĉu ni ne multe pli submetiĝu al la Patro de la spiritoj kaj vivu?" Hebreoj 12:9.

Vi Estas Ido de Dio

Ni ĉiuj antaŭvivis en la ĉeesto de Dio, la Eterna Patro. En la antaŭtera vivo, vi estis Lia spiritido. Kun ĉi tiu dieca deveno, via destino pere de virta vivo fariĝi kiel via Ĉiela Patro kaj reiri en Lian Ĉeeston.

La Tero Vivo Estas Dieca Plano

En via antaŭnaska vivo, antaŭ la kreo de la tero, Dio prezentis planon al Siaj infanoj por ke ili progresu. Vi estis libera akcepti aŭ rifuzi tiun planon de savo. Tiuj spiritidoj, kiuj akceptis Lian planon ricevis la eblecon vivi sur la tero: tiuj, kiuj rifuzis Lian planon ne ricevis la privilegion esti mortemaj.

Via Celo en la Vivo

"Jen ĉi tiu vivo estas la tempo por la homoj prepari por renkonti Dion; ja, jen la tago de ĉi tiu vivo por homoj faras iliajn laborojn." Alma 34:32.

Vi Devas Elprovi Vin Antaŭ Dio

"Kaj ni provos ilin ĉi-maniere por konstati, ĉu ili faros ĉion, kion la Eternulo, ilia Dio, ordonos al ili. Kaj tiuj, kiuj konservas sian unuan staton, ricevos aldonon; kaj tiuj, kiuj ne konservas sian unuan staton, ne havos gloron en la sama regno kun tiuj, kiuj konservas sian unuan staton; kaj tiuj kiuj konservas sian duan staton, ricevos aldonon de gloro sur siaj kapoj por ĉiam kaj eterne." Abrahamo 3:25-26.

Kion la Mortemeco Provizas al Vi

Veninte al la tero, vi ricevis korpon el karno kaj ostoj, kaj spite al la morto, estas promesite al vi eterna releviĝo. Vi ankaŭ havas la eblecon vivi per fido, for de Dio kaj tiel elprovi vin mem. Vi ricevis ordonojn kaj leĝojn kun la libereco obei aŭ malobei - sed vi kompreneble, respondecos pri viaj elektoj.

Dio Volas, ke Vi Sukcesu

Dio esta justa. Per via libereco, vi povas elekti inter bono kaj malbono. Li scias, ke vi faros erarojn. Ĉar la pekulo ne povas, per sia propra povo, releviĝi kaj reiri antaŭ sia Ĉiela Patro. Dio donis la vojon, kaj se vi akceptos la rimedojn metitajn en via atingebleco, vi povos renkontiĝi ankoraŭfore kun via eterna familio.

Dio Benis Viajn Unuajn Gepatrojn

"Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili, fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj,

kiuj moviĝas sur la tero." Genezo 1:28.

Adam Ebligis Vian Vivon

"Adam falis, por ke la homoj estiĝu; kaj la homoj ekzistas, por ke ili havu ĝojon." 2 Nifai 2:25.

Vi Povas Gajni la Savon per Jesuo Kristo

Ĉar kiel en Adam ĉiuj mortas, tiel same ankaŭ en Kristo ĉiuj estos vivigitaj." I Korintanoj 15:22.

Kristo Estas Via Elaĉetanto

En la antaŭtera vivo, Jesuo Kristo oferis preni sur sin mem la pekojn de ĉiuj, kiuj vivos sur la tero. La sendifekta tera vivo kaj ofero de tiu Perfekta Estulo ebligis la releviĝon de ĉiuj homoj kaj la reiro de la fideluloj kaj pentemuloj al la ĉeesto de Dio.

Dio Oferis Sian Perfektan Filon per Vi

"Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon." Johano 3:16.

Kristo Suferis pro Viaj Pekoj

"Ĉar Kristo ankaŭ unu foje suferis pro pekoj, justulo pro maljustuloj, por ke li nin konduku al Dio, mortigite en la karno, sed vivigite en la Spirito." I Petro 3:18.

Kristo Povas Vin Elaĉeti

"Kaj se iu pekas, ni havas advokaton ĉe la Patro, Jesuon Kriston, la justan: kaj li estas repacigo pro niaj pekoj..." I Johano 2:1-2.

Kontraŭ en Ĉio

Se ekzistas kontraŭo en via vivo - estas fortoj, kiuj celas vian malsukceson. Lucifero, antaŭ ol komenciĝis la mondoj, estis la advokato de ĉiuj, kiuj kontraŭstaris la planon de savo de Dio. Li ŝatus influi vian vivon hodiaŭ, li estas la advokato de ĉia malbono. Li tentus vin resti malpura.

La Elaĉeto de Kristo

En la spirita mondo antaŭ ĉi tiu mondo, vi estis inter la fideluloj. Vi gajnis tie, la rajton esti sur la tero hodiaŭ. Kristo, per sia perfekta vivo kaj persona sinofero, provizis elaĉeton por viaj pekoj, nur kondiĉe, ke vi akceptu kaj sekvu Lian planon de savo.

Ĉiuj Homoj Bezonas Pentis

"Ĉar ĉiuj pekas, kaj maltrafis la gloron de Dio." Romanoj 3:23.

Savo por Vi Venas Nur Per Kristo

"Kaj plie, mi diras al vi, ke neniu alia nomo aŭ metodo aŭ rimedo estos donata por venigi savon al la homidoj ol nur la nomo de Kristo, la Sinjoro, la Plejpotenca." Mosio 3;17.

Vi Ne Suferos Se Vi Pentos

"Jen, mi, Dio suferis ĉi tion por ĉiuj, ke ili ne suferus se ili pentos: tamen, gloro estu al la Patro, kaj mi partoprenis kaj finis miajn preparojn al la homidoj." Doktrino kaj Interkonsentoj 19:16-19.

La Graco de Dio

Via Eterna Patro, pere de Sia graco malkaŝis la planon de savo per Siaj sanktaj profetoj ekde la komenco de la mondo. Per iliaj inspiritaj vortoj kaj per la Sanktaj Skriboj, ĉiuj esencaj leĝoj kaj ordonoj estas malkaŝitaj. Sed Dio ne povis akcepti la ĝustan vojon por vi: vi mem devas tiun elekti.

La Vojo - La Evangelio de Jesuo Kristo

La unuaj kvar principoj kaj ordonoj de la Evangelio estas esencaj paŝoj al savo kaj estas la eniro al la Eklezio kaj Regno de Dio. Ĉi tiuj paŝoj estas atingeblaj, kaj la akcepto de ili estas necesa por meriti ĉiujn benojn oferataj per la elaĉeto de Jesuo Kristo.

Vi Estos Juĝita Laŭ Viaj Faroj

"Kaj mi vidis la mortintojn, grandajn kaj malgrandajn, starantajn antaŭ la trono; kaj libroj estis malfermitaj; kaj estis malfermita alia libro; kiu estas la libro de vivo; kaj la mortintoj estis juĝataj el la skribitaĵoj en la libroj, laŭ siaj faroj." Apokalipso 20:12.

Neniu Malpura Povas Loĝi Kun Dio

"Tial, se vi klopodas fari malbonon dum la tagoj de via elpruvo, tiam vi estos trovita malpura antaŭ la juĝa seĝo de Dio, kaj neniu malpura povas vivi kun Dio." I Nifai 20:21.

Vi Ne Povas Esti Savita en Viaj Peko

"Li diris, ke neniu malpura povas heredi la Regnon de la Ĉielo, tial vi povas esti savita, se vi heredos la Regnon de la Ĉielo, tial vi ne povas esti savita en viaj pekoj." Alma 11:37.